PENSEO

N-ro 349

nov. / 2020

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 31-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Gafur Mirzo (Uzbekio)



LA VIVO

Kion signifas la Vivo
por la Homo sur Tero?
Por kiu Ĝi estas ĝuo,
kaj por kiu sufero!
Kaj por kiu Vivo estas
nur sensenca amuzo
Kaj alia iu eble
uzas Ĝin por la ruzo!
Kiu dum la tuta Vivo
senĉese ridas, ĝojas
Tamen sur alies vojo
hundaro ĉiam bojas!
Kaj por kiu ĉiam ĉie
ĉio nur pure veras
Sed alia pro l' malvero
senfine tuttoleras!
Por kiu la Vivo estas
pura kaj plena puto
Kiu ĉiam bezonegas
je eta akva guto.
Por kiu la Vivo estas
vojo glata kaj rekta
Sed Ĝi por aliu estas
nur la pado neglekta.
Multaj Homoj uzas Ĝin nur
por trinki kaj manĝi
Sed Ĝin uzas noblaj Homoj
por la Mondon aranĝi.
Kaj la Vivo por la kelkaj
amuza ludo ŝajnas
Kiu en la ludo ĉiam
malbonŝancas, malgajnas.
Por kiu Ĝi estas Ĝarden'
belega, buntkolora,
Por aliul' estas Revo
ne atingebla, fora.
Al kiu en Vivo ĉiam
kunvojaĝas la Amo
Tiu kantas dum la Vivo
nur en la gaja gamo!
Por la multaj Vivo estas
nur postkuri la monon
Por ŝaĝuloj — ŝanc' por fari
al la Homaro Bonon!
Se Vi sentas Vin la Homo
en ĉi komuna Domo
Penu ĉiam vivi en Viv'
kiel la Vera Homo!
Dume Vi estas vivanta
ne forgesu Homdecon!
Aprezu en vivo VIVOn,
Pacon kaj Amikecon!
Ne perdu Vi vane Vivon,
ĉiam havu Homdignon!
VIVO ja estas por lasi
ion bonan postsignon!
De l' poeto pri la Vivo
estas dedukto — JENO:
VIVO por la sekva Mondo
estas la EKZAMENO!

la 15-an de aŭgusto, 2020

Taŝkento, UZBEKIO



Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Mi volas esti via papilio

Mi volas esti via papilio,
lasu min danci sur vi.
Ho, amato, karulo,
lasu min danci sur
via alloga korpo.
Lasu min flirti ĉe vi,
ĉe via impertinenta buŝo,
ĉe viaj bluaj okuloj,
sur via nazopinto,
sur via amorilo...

humm..

Ho, amato, karulo,
lasu min danci sur vi.
Mi volas esti via papilio.
Flirti al vi mi volus.
Surflugi vin mi volus.
Sur vi danci mi volus.
Kaj zigzagi sur vi mi volus,
ĝis mi svenus sur vi,
tion mi volus.

Forflugi mi volus.
Kaj reveni mi volus.
Fuĝi denove mi volus.
Ke vi kaptas min, mi volus,
ke vi ĉasas min, tion mi volus!

Vidu al mi, mi revenas jam al vi.
Mi jam dancas sur vi.
Mi jam krias sur vi.
Hura! Amato! Hura!
Nun jam vere sur vi.

Mia amato freneza,
knabo mia, amorulo,
karulo, frenezulo,
volupta knabo.
Mia kara amato.

Kaptu min!
Prenu min!
Vi! Oh!
Ho, vi!

Mi volas esti via papilio.
Lasu min flugi sur vian korpon.
Lasu min danci sur vi.
Ho, dolĉulo, karulo mia,
mia amato freneza.
Lasu min danci sur vi,
sur viaj glataj vangoj,
sur via bela nazo,
sur via dolĉa buŝo,
sur viaj ruĝaj lipoj,
sur via raŭka lango...
sur via langopinto.

Ho jes, ah, jes.
Haaaaa, jes.

Lasu min danci sur vi,
sur via pinta lango,
huuuummm...
sur via langopinto...
hmmmm, kara...
mi krias, aaaaaaah,
mi krias, hooo, vi!
Bele! Bele!
Jes! Faru!
Hmm,
humm...

Mi volas esti via papilio.
Vidu, mi dancas sur vi.
Mi tuj mortos sur vi.
Ho, mia amo freneza,
petola knabo, vi dolĉas,
mi tuj mortos, jes...
dolĉe mortos...
sur vi.


Rita Mkrtchyan (Armenio)



Mi ne povas kompreni la homojn,
Pri la kulpo diskutas, decidas,
Nur informaj ciferoj por iuj
Eĉ la agojn kruelajn pravigas.
Mi ne povas kompreni la vivon,
Ne kutimas kaj paco, kaj amo,
La sufero plenigis la marojn
"Ŝtormas" homa malam' kiel flamo.
Mi ne povas kompreni la koron
Ĝi doloras, tagiĝo malhela,
Ĉies viv' kiel gutoj de sango
Ploras tero kaj griza ĉielo.

P.S. Ne gravas pasinteco, la historio ĉiujn juĝos, gravas la popolo, kiu ne impetis al milito, al senkulpaj mortoj, kiu dum tuta sia ekzisto celis vivi en paco, kun paco!

Siranuish Slagmulder (Francio)



Nacia Libereca milito...

La nigraj nuboj kovris la ĉielon,
Nokt' anoncis la teruran militon.
Birdoj timige kriis forflugante,
Atestis sur Ter' morton alvenontan.
Pro la frapanta armilo barbara
Al la lulilo de l'infano dormanta.
La Morto eniris rikanante forte
Sendas malfeliĉon nigre vestitan.
Domoj detruiĝis, kiel skatoletoj,
En lernejoj mortis miloj da infanoj,
Ploregis la patrinoj, sed kun kuraĝo
Prenis la pafilojn kontraû malamiko.
Sur batalkampo fumas la kadavro,
Bruas nur armiloj en fum' ĉiela spaco.
Mortas, mortigas... nenion iu komprenas;
Nur la malamo, jen, kiel birdo flugas…
Jen la mortanto ion murmuras...
Li ne volas morti, ĉi juna soldato,
Videblas la vizaĝo de sia patrino
Kaj ŝatata Monto de Patrolando...
Armenio mia! Historia Tero,
Ararat' mia! biblia Montaro
Staras fiere kunbrakumas valon
Kie kun bruo fluas ĉarma Araqso!
Neniu povus venki nin, Armenojn!
Neniu kuraĝus okupi nian Sanktan Teron
Ni ekstaras kontraŭ kruela malamikeco!

05/10/202

Tagiĝo

Vesperas. Jen! videblas la grandioza domeg'
de la Sun'
Ĝia pord' jam fermiĝas, misteras la spektro de
la Lun'.
La vesper' sekrete rigardas foren por kaŝi la
tumulton,
Kaj nur la ĉielo trankvile sekvas la plenstelan
ekzalton!
La steloj diskrete revenas dum alveno de
nokta temp'
Volante por montri la vizaĝojn sentime kaj
kun prudent'!
L'Aŭroro kun tenero elvekas la rideteman
Sunon,
Kune alportante la gefilojn! la Esperon kaj la
Lumon.
Tempas!la Klarec' transplantas rideton en la
kor' de l' flor'
Reaperas splenda tago kreskigante la bonecon
en kor'.

18.04.2020

Papos Nascentes (Brazilo)



SUPERNOVA

eksplodas lume
tutaj partioj
malaktivaj leĝisdomoj
sensaĝaj judicaj povoj
ekzekutitaj ekzekutivaj povoj

ĉio putriĝanta
rekunmetanta humile
en unio

Wally Du Temple (Kanado)



Tradicioj de la Amiŝoj

Mi vekiĝas en urbeto Amiŝa
Centro de farmkulturado varia
Kie kamparanoj arde bienumas
Virinoj kun ŝtrumpoj nigraj, longaj jupoj
Viroj kun barboj maturaj, ŝelkoj elastaj
Rezistas kontraŭ influoj modernaj.
Nenia monoagrikulturo monotonas
Kampoj novalas
Porkoj, bovinoj paŝtas ĉe nekulturata
plugter'
Rotacio de rikoltoj kutima afer'
Maizo, milio, luzerno, tritiko
Pennsylvaniaj kampoj jen bunta stebaĵo.
Trarigardante gastejan fenestron
Subite mi aŭdas sonon 'klip klop, klip
klope'
De feraj hufŝuoj ritme sonritme 'klip
klope'
Antaŭ ol mi vidas kaleŝon nigran, ikone
Amiŝan
Dratradioj kirle kaŝitaj pro radrapidec'
Kaj aĝa presbitero per gvidperfektec'
Bridas sian ĉevalon por halti
Kaleŝon kiel aŭto
En traveturebla memserva vojo
Por depreni
Monbiletojn de pagista maŝino
Per plasta
Debitkarto.

Akvopaŝegantoj

Ĉu iu povis scii
Ke iu povus skii
Tutvive sur la Ruĝa Mar'
Ĝis glitis la insekta par'
Sur ondoj surfacsurfantaj
Dorsoj glimas karapacaj.
Kunteniĝa akva haŭto,
Dancteatro de planedo.
Familia glitlascivo.
Sur molekula saltensio



Wel CR (Brazilo)



Makarone

Dum fone la trombono laŭtsonas
vi akordione fanfaronas.
Tutsubite l' trombono fuŝtonas,
vi en laŭbarakto jam ronronas.
(Iom poste)
Silento falas tombe.
La trombon' staras aplombe.
Vi stumblestomble !!!



La Trajno

La relojn de l' rememoro
trajn' iama kun mi pasas
(kuniras mia animo)
Trajn' iama, hodiaŭa,
trajn' al la morgaŭo transen
(vojaĝe la du sen timo!)
La trajno longaĝojiras.
Vivodornoj ne plu ŝiras.
Jam en sonĝo mi ŝekspiras !!!
"Hej" min veke l' anim' diras .

Siv Burell (Svedio)



Jaron post jaro restas la estrar'

Jaron post jaro restas estrar'
reelektita de membroj sen bar'
Membroj kutimas al konata estrar'
certe nur timas mem esti sur la ĉar'

La ĉaro de estraro nestabila estas
misfaro, eraro ?
Sed estraro restas.
Post tempo ŝtoniĝas la vigla movad'
ĉu inspiro troviĝas ĉe juna kread' ?

Sed kie vi estas vi juna dekumul'
ĉu vi vin vestas
por esti herkul' ?
La kulpon por la stat' de nia movad'
mi ĵetas al vi elektintoj en parad'.

Se vi helpus per konsil' pli agrabla estus sent'
per via komputil' vi puŝu al turnvent'
La vent' kaprice blovu inspire al estrar'
kaj iam oni povu labori sen kompar'
kun triumfa mien'
por esperanto,
por politika
aŭ idealisma partio.

Jadranka Miric (Serbio)




Vea revado

Svinganta tiliar'
etendiĝis branĉar'
ĝis la domomuro.
Ombro kiel spuro!
Ruĝas vino en vitra glaso,
surtabligita estas bakita anaso
por via favorata festo.
Antaŭ morna tempesto!

Neniu estas en la domo,
nek sur la fenestro pomo
ruĝas. Nek fontano funkcias pli .
Homo fantoma , kiu speco estas vi ?
Forgeso spurojn viŝas,
pasinteco ne revenas .
Homo pasintecon kaŝas
egoiste. Pri ammemoroj ve, revas!

Multaj jaroj poste

Sub nuda tiliobranĉar'
estas benko kun skribita nomar'.
Iuj parolis kore pri anĝelopar',
iuj nomoj estis ĉizitaj . Bona far'.
Iam sidis tie enamiĝintuloj
per kisoj sunon salutintaj,
forte ame brakumintaj.
Vivis pie tiuj delikatuloj.
Forflugis tempo. Restis spuroj.
Ŝanĝiĝis mondo, falis multaj muroj.
Malpermesitan amon neĝo kovris.
Vi benkon purigis, nia anĝeloparo
aperis!
Vi rigardis al blua ĉiel',
mi ‚via amara miel'
rigardas vian svingantan manon.
Bonan sanon! Forgesu doloran amon!



Svetlana Konasova (Rusio)



Du hajkoj

friska mateno—
en krizantema floro
kulo dormetas

e krizantemoj

mi ripozas — subita
flora odoro

Mimoza Ahmeti



La frenezulejo kun apertita pordo

Vi foriras, nin forlasas,
"Porĉiame", pensante
El ĉi tiu tero kiu la via, la nia estas,
Kaj nia frenezulejo tio estas.
Nia kara, raviga frenezulejo,
Kun la ŝirigaj kranioj.

Ho, karaj frenezuloj miaj.
Kiom mi amas vin,
Kvankam neniam mi vin alparolas,
Kvankam neniam vi min alparolas,

Kaj mi apenaŭ vin eltenas
Kaj vi apenaŭ min eltenas.

Sed tio estas rito.
Ni ne vidas unu la alian okulokule,
Ne malamante,
Kaj tio estas ja kialo
Por ĝis freneziĝo interamiĝante,
Delire ridetante,
Dum sur la facoj
La larmoj fluas
La larmoj.
Miaj kunsuferantoj,
Elmigrece forirantoj,
Disde nia unika frenezulejo,
Kun la fiksitaj anguloj
Post unu sola ideo,
Ho, nur post unu sola ideo,
Kiu neniam vidiĝis, nenie troviĝis
Kaj mi ne scias ĉu iufoje estos trovata.
Disiru, foriru, malaperu,
Landlanden kaj ŝtatŝtaten....
Ho, kia kriego krias
El la nia frenezulejo
En la malfrua horo de la krepusko,
Kiam li sopiras pri la filoj en Okcidento...
Kia tristeco!
Senhaŭtigitaj muroj..Muroj kiuj ĉiam
Limigas la horizonton
Por lasi supre senfinan ĉielon.

Tie, post la noktomezo la singultoj finiĝas,
Kelkiu al si parolas:
Tamen al la albano
Kie ajn li troviĝas
Sia frenezeco ja sufiĉas..

Elalbanigis



Bardhyl Senimi (Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Su Shi (1037-1101)

Aŭtunmezo

—laŭ melodio *Ĉarma kantistino*

Sur altaĵo mi rigardas:
vasta kaj sennuba la ĉielo
etendiĝas ĝis senlimo;
lun' alflugas en malvarma helo
kaj disverŝas lumon, kiu
mergas la ĉielon kun lazura belo
en aeron fridan;
la palac' el jado en lunfabelo
ja aspektas ĉarme kaj impone;
la feinoj ir-reiras en etero
al la luno freŝa kaj glacia
rajde per feniksoj kun libero;
tra la fumnebulo arboj jen vizias
inter pitoreskaj monto kaj rivero.

Mi kunfrapas manojn fole
kaj kantadas en ebri'.
Mi, la ombro kaj l' luno

kune ĝuas tempon en orgi'.
Ni triope dancas en rosduŝo
kaj zefiro kun ĝojkri',
forgesante la temppason.
Mi ja volus per magi'
rajdi al la lun' per vento,
jen anstataŭ per giganta cikoni'.
En kristala lunpalaco flutojn
oni ludas jam per melodi'.

Mi vizitis Templon Qingquan

Mi vizitis Templon Qingquan de Qishui, proksime al rojo Lanxi, kiu fluas okcidenten.

—laŭ melodio *Silk-lava rojo*

Submonte ŝosoj de eŭpatorioj
trempiĝas en rojflu'.
La pado sabla inter pinoj
jen puras sen kotglu'.
En nebulpluv' kukoloj
kukuas kun laŭtbru'.

Kiu asertas, ke juneco
revenos jam ne plu?
La rojo Lanxi eĉ inverse
ja okcidenten fluas, ĉu?
Ne plendu pri rapida tempopaso,
ni blankharuloj en enu'!

Adiaŭado al amiko, kiu reiras al hejmloko

—laŭ melodio *Verdjada taso*

Dum tri jaroj mi eĉ sonĝas
pri l' revena vojo tag' post tago.
Leterhundon mi forsendas
kune kun vi en reira vago.
Ĉe pramejo ne alvoku l' boaton
laŭte, por ne ekpaniki per krud-ago
amobirdojn kaj ardeojn.
Tieaj kvar pontoj en zigzago
estas lokoj, kiujn mi tre ŝatis
iri laŭ rutina trako.

Spektu vidindaĵojn tiulokajn
en printemp' malfrua,
kiuj ja similas al pentraĵo
el la fama mano kontribua.
Ofte ĉantu versojn de poetoj
famaj kun apetito ĝua.
Jen revenu je la dato difinita
de imperiestro sen prokrasto plua.
La printempa vesto sur vi
fare de mia amatino iam
malsekiĝis de larmpluv' alglua.

Vortoj pri la printempo

—laŭ melodio *Mallongigita melodio magnolia*

Kulti kotajn bovon kaj plugilon,
laŭ l' kampolabora tradicio,
ja heroldas la printempan okupiĝon
pri semad', plugad' sub bona aŭspicio.
Jam de l' maro blovas vento
longedaŭre sen vario.
La printempa mano lerte,
majstre farbas kun pasio
persikruĝon karn-kolore.

Per verdflagoj kult-ceremonio
jen ornamas kampojn primaverajn.
Min alblov' sobrigas el ebrio
pro drinkado de alkoholaĵo.
Ne simile al la kaba dimensio,
salikflokoj flirtas jen ĉi tie,
kiel neĝo ŝvebas de magio.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Chen Tao (812 - 885)

Melodio Longxixing

Ekstermi hunojn ili ĵuris spite sian vivon,
kvin mil soldatoj bontrejnitaj mortis bataleje.
Veindas la skeletoj ĉe l' rivero Necerteco—
ankoraŭ l' junedzinoj sonĝas pri la kara pleje.

Quan Deyu (759 - 818)

Sopiro al amo

Hieraŭ nokte loziĝis jupzono;
araneeto ĉi-matene flugas.
Ĉu tio signas revenon de l' edzo? –
Al ŝminko haste mi min alkondukas.

**Antikvaj ĉinoj kredis pri la superstiĉo: kiam jupa zono mem loziĝas, aŭ kiam araneeto ekflugas, tio aŭguras ian feliĉon baldaŭ okazonta.*

Liu Shenxu (? - ?)

Sen titolo

Perdiĝas inter blankajn nubojn vojo,
printempo longas kiel verda rojo.
fojfoje floroj falas, kaj de foro
alŝvebas el akvfluo bonodoro.
Kvieta pord' vizaĝas al aleo;
en salikaro sidas ĉi studejo.
Dum la sunlum' tra branĉoj glimas,
sur mian veston sin helbril' pavimas.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-TRIA

Gengsang Chu

§23-02

Nanrong Chu side rektigis sin sur sia postaĵo kun konfuzita mieno, dirante:

"En mia aĝo jam sufiĉe granda, kiel do mi lernu de vi, por atingi vian idealan staton?"

La majstro Gengsang lin respondis:

"Tenu vian korpon bonstata, konservu vian naturon, ne trostreĉu vian menson, kaj vi atingos mian staton en tri jaroj."

"Mi ne scias, kiel la okuloj estas diferencaj unu de la alia en formo," ree demandis Nanrong Chu, "sed la blindulo ne povas vidi per siaj okuloj. Mi ne scias, kiel la oreloj estas diferencaj unu de la alia en formo, sed la surdulo ne povas aŭdi per siaj oreloj. Mi ne scias, kiel la mensoj estas diferencaj unu de la alia en konstituo, sed la frenezulo ne povas ĝuste pensi per sia menso. Mi havas la saman formon kiel vi, sed ŝajnas, ke inter ni devas esti diferenco, ĉar ni apenaŭ povas egale pensi. Kiam vi diris: 'Tenu vian korpon bonstata, konservu vian naturon, ne trostreĉu vian menson, kaj vi atingos mian staton en tri jaroj', mi penis kompreni viajn vortojn, tamen ili eniris en miajn orelojn nur kiel bruoj, kies sencon mi ne kaptis."

"Mi jam diris ĉion, kion mi povas diri," diris la majstro Gengsang. "Oni diras, ke la malgranda vespo ne povas elkovi grandan raŭpon, kaj la malgranda kokino el la regno Yue ne povas kovi cignan ovon, sed la granda kokino el la regno Lu tion povas. La kokinoj estas dotitaj per la sama kovkapablo. Iu el ili povas kovi tian ovon, dum la alia tion ne povas, ĉar la grandeco de iliaj kapabloj estas diferencaj inter si. Mi ne povas lumigi al vi tiun ĉi temon, ĉar mia kapablo estas malgranda. Kial do vi ne iras suden por viziti Laŭzi?"

Kun sufiĉa provizaĵo por la vojo Nanrong Chu marŝis sep tagojn kaj noktojn kaj fine atingis la lokon, kie Laŭzi vivis.

"Ĉu vi venas de Gengsang Chu?" demandis Laŭzi.

"Jes," respondis Nanrong Chu.

"Kial vi venas kun tiom da homoj?" demandis Laŭzi.

Nanrong Chu time ĵetis rigardon posten.

"Ĉu vi ne komprenas miajn vortojn?" demandis Laŭzi.

Nanrong Chu honte mallevis la kapon kaj poste, levinte la kapon al la ĉielo, profunde eksuspiris.

"Mi nun forgesis, kiel mi devus respondi, kaj pro tio mi forgesis ankaŭ mian metotan demandon," diris Nanrong Chu.

"Kion do vi volas diri?" diris Laŭzi.

"Se mi estas en nesciado, tiam oni diros, ke mi estas stulta; se mi estas en sciado, mi kaŭzos al mi zorgojn; se mi ne sekvas la humanecon, mi malutilos al aliaj; se mi sekvas la humanecon, mi malutilos al mi mem; se mi ne sekvas la justecon, mi ofendos aliajn; se mi sekvas la justecon, mi ofendos min mem. Kiel mi povos eltiri min el tiuj ĉi tri dilemoj, kiuj min turmentas? Mi esperas, ke vi bonvole helpos al mi eliĝi el ili pro la rekomendo de mia majstro Gengsang Chu."

"Kiam mi ĵus direktis mian rigardon en viajn okulojn," diris Laŭzi, "mi eksciis, kio vin konfuzas en la menso. Viaj paroloj plu konfirmis mian opinion. Vi estas en tia konfuzo, ke vi aspektas kiel infano, kiu, perdinte siajn gepatrojn, provas retrovi ilin per stango en la maro. Vi estas kiel senhejmulo, tute vojerarinta. Vi deziras reakiri vian denaskan naturon, sed vi ne scias, kion fari. Kia kompatinda homo vi estas!"

Nanrong Chu petis permeson resti kun Laŭzi kelkan tempon, por ke li povu kulturi en si tion, kio estas bona, kaj senigi sin je tio, kio estas malbona. Post dek tagoj, sentante tian sinkulturadon tre malfacila, li malgaja ree iris al Laŭzi.

"Nun ke vi penas purigi vian menson, kial vi ankoraŭ estas tiel malgaja? Tio signifas, ke vi ankoraŭ retenas en la menso iajn malbonajn ideojn. Kiam via maltrankvileco ne povas esti regata de ekstere, vi devas bridi ĝin de ekstere; kiam via maltrankvileco ne povas esti regata de interne, vi devas bridi ĝin de interne. Kiam via maltrankvileco ne povas esti regata kiel de interne tiel ankaŭ de ekstere, tiam eĉ tiuj, kiuj atingis la Taŭon kaj posedas la virton, apenaŭ povas sin regi, por ne paroli pri vi, kiu ĵus komencis lerni la Taŭon!"

"Supozu, ke vilaĝano falis en malsanon kaj lia najbaro venas lin vidi," diris Nanrong Chu. "Se la malsanulo povas rakonti, kio okazis al li, kaj diras, ke li estas malsana, tio montras, ke li ne grave malsanas. Ĉiufoje, kiam mi aŭdas ion pri la Taŭo, mi estas kvazaŭ tiu, kiu pli grave malsaniĝas post kiam li prenas la medikamenton. Tial mi volus aŭdi de vi nur pri la maniero bone konservi la vivon."

"Koncerne la manieron bone konservi la vivon," diris Laŭzi, "vi nur demandu al vi ĉi tiujn demandojn: Ĉu vi povas resti pura kaj simpla? Ĉu vi povas konservi vian denaskan naturon? Ĉu vi povas antaŭdiri vian sorton sen aŭgurado? Ĉu vi povas scii kie halti? Ĉu vi scias kiom estas sufiĉe? Ĉu vi povas peti ion de vi mem anstataŭ de aliaj? Ĉu vi povas esti libera de zorgoj kaj maltrankvilo? Ĉu vi povas esti naiva kaj senscia? Ĉu vi povas konduti kiel novenaskito? La novenaskita infano povas ploradi tuttage sen perdi sian voĉon, ĉar ĝi estas en la perfekta harmonio de la konstitucio. Ĝi povas pugnigi la manojn tuttage sen konvulsiiĝo, ĉar ĝi estas en la perfekteco de sia naturo. Ĝi povas fikse rigardadi tuttage sen turni siajn okulojn, ĉar ĝi estas en la perfekteco de sia mensokoncentriĝo. Ĝi paŝas sen scii kien iri kaj haltas sen scii kion fari. Jen la maniero bone konservi la vivon."

"Ĉu tio do estas la virto de la perfekta homo?" demandis Nanrong Chu.

"Ne," respondis Laŭzi. "Tio estas nur la maniero aktivigi la menson ĝuste kiel degeligo aŭ fando de glacio. Ĉu tio povus esti egala al la virto de la perfekta homo? Por konformigi sin al la naturo, la perfektaj homoj dividas la nutraĵon kun la tero kaj dividas la ĝojon kun la ĉielo. Ili ne implikiĝas en komplikajn homajn interrilatojn, nek riproĉas unu la alian, nek intrigas unu kontraŭ la alia, nek kunlaboras unu kun la alia. Ili foriras sen maltrankvilo kaj venas sen zorgoj. Jen la maniero bone

konservi la vivon.”

“Ĉu tio do estas la plej perfekta stato?”

“Ankoraŭ ne,” diris Laŭzi. “Ĵus mi demandis vin: ‘Ĉu vi povus konduti kiel novenaskito?’ La novenaskita infano moviĝas sen scii kion fari kaj paŝas sen scii kien iri. Ĝia fizika formo estas kiel sekiĝinta arbo kaj ĝia koro estas kiel malvarma cindro, sekve al ĝi venas nek malfeliĉo, nek feliĉo. Kiam ekzistas nek la malfeliĉo, nek la feliĉo, kiel do oni povas suferi afliktojn kaŭzitajn de homoj?”

Elĉinigis



Wang Chongfang (Ĉinio)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbio)

Serĉi konsolon

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Mezaĝa
paro. Silento
inter ili doloras.
Ve, larmoj en torento.
Divorc’— fisento .

En okul’
via svelta siluet’.
En la malpena ĉambro
nia danco “manuet’”.
Ve, nia duet’.

Malnova
pordo fermiĝis.
Preferas vi la novan.
Doloro plilongiĝis.
La am’perdiĝis.

Rikolto
riĉa aŭtuna.
Nia mala, malpura.
Ŝia ag’ oportuna.
Dank’ al mi juna.

Animo
disŝirita.Ve.
Melankolio regas.
Ofte vagas Lun’ kun mi.
Gaja estu vi!

Laŭspuroj de iama familia domo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Muzikon
de la naturo
ĉu vi iam aŭskultis?
Jen, mia aventuro.
Kri’ de naturo!

Decido
longe farita.
Mi vizitos bienon
de avin’ heredita.
Sur altaĵo trovita!
.
Transe de
river’ Timoko,
fore de riverbordo.
Al mi okazis ŝoko.
Mizeras loko.

Ruino
anstataŭ domo.
Arbusto kaj ilekso!
Nek florbedoj nek homo.
Nek bestodomo!

Kun tero
superŝarĝita
iu traktoro foris.
Vinberejo manĝita.
Anim’ streĉita!

Aŭtuna tago

Krepusko.
Luno tra stelar'.
Ruĝiĝis ĉiel'. Flugis
alten kun krioj birdar'.
Jen, vagas sturnar'.

Odoras
tero je pluvo.
Aŭdiĝas tondro ie.
Grundo kvazaŭ bankuvo.
pluva fipruvo.

Sub ombrel'
paro brakumita .
Man- en-mane ŝvitanta
pro pasio ŝvelita
ame ligita.

Ĉirkaŭe
ŝvebanta flava
disĵetita foliar'.
Kliniĝas al arb' brava.
Jen, bildo rava.

Blankiĝas
bird'. Mi vidis ĝin.
Unusola kolombin'
kun idar' en sia sin'.
Mira bird-destin'.

Ankoraŭ Aŭtuno someras

Lazuras
ĉiel' senfina.
Varmo milde karesas
nin. Tiklas odor' pina.
Natur' diina!

Agrabla
promeno. Homoj
malkovras naturbelon
en renaskiĝo. Amoj
tra florsezonoj!

Vespero
kvazaŭ limarko
venis frue kaj nuda.
Sur via dorso sako
lia lanjako!

Vetero
ofte trompema
kaŭzis malsanojn.Tial
nek estu hezitema
nek suspektema!

Malfrua
aŭtun' brilas kaj kore
nin salutas. Ni festu
venontan vintron kore ,
anime glore!

**Sopir-al-sudo: ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarangô xa,xa,a (x=senrima).*

Papos Nascentes (Brazilo)

VENĜO

Li maĉis. Kaj maĉis. Oni ne scias, kion li tiom interdente pistis. Maĉ-gumo ne. Pro naŭzo, li diradis. Mem-riproĉoj, klaĉaĵoj, eble. Ĉu la kolero pro la englutita fivorto? Ĉu la ne vomita sakrado? Ĉu la remuelado de la vivo – "malmola kiel ŝtalo"?

Mordis li la langon. Tiom da sango! Preskaŭ manke li mortis.

MI VOLAS AVINJON!!!

En la tempo de Avinjo, la kuraco de frenezeco estis... pastro. Venis la pastro. La kuraco, kelkfoje. Hodiaŭ estas multa frenezeco premiata: posteno en publika povo, estrado, prestiĝo. Diri kion oni volas fordonas prestiĝon, fidelajn sekvantojn. Agordo naskas admiron kaj voĉdonojn. Pri frenezeco tamen mi iom scias pri la mia, eĉ se preskaŭ nula estas la barilo de la najbaro. Frenezo-portas-frenezon, iĝas torturo, rompiĝas la delikata haŭto de la realo. Multaj frenezuloj, la aliaj, malmultaj. La demokratiigo de la frenezeco, fakto: novaĵoj instigas, propagando promesas, profesio plenumiĝas.

Min mi relegas, nur pumpla teorio, malpli rapidiĝinta ol devus esti. La artifiketo min devias de mia torda, tortura, trista sento. Volo, fadeno de araneaĵo for de la teksaĵo, forestanta kunteksto, facile rompebla, kial la saneco, pri kio malmulte oni scias, enmerkatigo en la apoteko. Mi iros al la psikiatro, sed nur postmorgaŭ: unue, mi rakontos rakonton, aldonas poenton. La lernejo min kondiĉis, poentojn mi ŝatas sur la bulteno. Eksteraj okazaĵoj eĥas ene, relegitaj ekstere, juĝoj, diagnozo, klaĉado. Plibone klaĉi en la ŝajnigo de la fikcio ol en la sanktejo de la konsultejo hodiaŭ sen pastro. La fakulo estis ĵus interrompita de la diktaturo de la horloĝo, la neŭroza krio de la poŝtelefono kaj ĝia obea kronometro.

Ankaŭ mi dresita de la senkvalifikebla obeado, malgraŭ mia bela freneza flanko volu ja iĝi neregebla. Mi volas Avinjon! Mi volas Avinjon!!!

Zhang Kangkang

La vojo reaperos post degelo de neĝo

Kiam mi atingis la urbon, vespero falis kaj neĝflokoj flirtis en la aero. Laŭ la adreso mi demandis pri la vojo kaj veturis trame preter plurajn haltejojn. Elirinte el la tramo, mi tute konfuziĝis, ne sciante, kie mi sin trovas inter tiuj, kiuj parolas strangan dialekton, kaj sur nekonataj stratoj. . Mi nur povis daŭre serĉi la adreson skribitan sur la papereto plena je rankoro.

Neĝo falis pli kaj pli dense kaj vento blovis pli kaj pli intense. Ĉio inter la tero kaj la ĉielo blanke kunfandiĝis sendistinge. Kun konfuza menso mi stumble iradis antaŭen…Sur la stratoj troviĝis preskaŭ neniu homo. Tiam mi ektrovis, ke mi perdis la vojon. Vidinte la lamplumon elĵetitan el la fenestro de la simpla unuetaĝa domo, mi frapis je la pordo. Maljunulino eliris kaj prenis mian papereton. Ŝi diris, “La loko estas tro malfacile trovebla. Mi gvidu vin tien!” Antaŭ ol mi dankis ŝin, ŝi jam eliris kaj paŝis sur la neĝo.

Ŝi turnis sian kapon kaj kriis, “Vi certe havas gravan aferon irante en tia neĝego, ĉu ne?” Mi respondis murmure. “Ĉu vi vizitos pacienton? Ĉu li estas via parenco, aŭ amiko? Kiom laca kaj maltrankvila vi estas! ” Ŝi malrapidiĝis, atendante min kaj frapforigante neĝflokojn de sur la ŝultro.

Mi perdis korbaton. Parenco? amiko? paciento? … mi silentis. Kiel mi povus diri al ŝi, ke mi fakte serĉas “malamikon” por ĵeti riproĉojn sur ŝin!

Ŝajnis al mi, ke dum tiu momento mi ekhavis radion da dubemo kaj ŝanceliĝemo pri mia motivo vojaĝi ĉi tien kaj ĝia signifo. Ŝi kaŝis sin en flirtantaj neĝeroj kaj malaperis kun la vento. Ŝi tiel faris eble pro senscio, aŭ pro momenta profito. Eble ŝi vere estis paciento, kiu bezonis kuraci anstataŭ vipi!

Subite mi eksentis mispaŝon sur la neĝo, kaj La maljunulino tuj kaptis min. Mi murmuris, “Malbenita neĝo, vere abomena…”

“Ne gravas, ne gravas. Ni baldaŭ atingos la lokon. Ĉe la fronta fosto ni nin turnu dekstren kaj iru antaŭen ĝis la tria pordo. Do, ni jam ĝin atingos.!” Mi diris,” Onjo, bonvolu reiri. mi jam konas la vojon ...” kaj poste mi mutis.

Ŝi refoje klarigis al mi la vojon al la domo, kaj sin turnante, hejmeniris. Post kelkaj paŝoj ŝi refoje turnis la kapon kaj kriis laŭte,” Ne gravas, morgaŭ kiam la suno leviĝos, la neĝo degelos, kaj reaperos la vojo!” La maljuna voĉo levita de la neĝo ŝancelpaŝis sur la malplena strato.

Mi staris longatempe en neĝo. Post kiam la neĝo degelos, reaperos la vojo. Do lasu la malvarman neĝon al la suno. Neĝo ne povas kovri eterne la vojon, kiu apartenas al piedoj.

En la neĝoŝtorma nokto, kiam mi finfine staris antaŭ la pordo, kiun mi penis por atingi, mi jam tute malhavis la senton de rankoro. Mi silente staris iom da tempo, kaj milde disŝiris la de neĝo malsekigitan papereton. Kaj poste mi malrapide paŝis al la stacidomo.

Elĉinigis

Jatina (Ĉinio)

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_
Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Retadreso: vejdo@163.com
www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm
_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_